HEJS

JUNULARA SEKCIO DE HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

REDAKTORINO:
F-INO CARMEN NAVARRO

Nro. 77 - 1972

Str. Barrencalle Barrena, 7 - 1.ª
Telefono 24 44 92 - BILBAO-5



# JUNAJ PARTOPRENANTOJ DE LA XXXII HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO, EN VIGO

# ENHAVO


| | | |
|---|---|---|
| Letero.................................. | Paĝ. | 1 |
| HEJS Reprezentantoj...................... | " | 2 |
| Ni Trankvile atendu...................... | " | 3 y 4 |
| Donacoj.................................. | " | 4 |
| Ĉu Kongreso de Esperanto?................ | " | 5 6 y 7 |
| Kongresinta HEJS-anino respondas......... | " | 8 y 9 |
| Rezolucio de la Internacia Seminario..... | " | 10 y 11 |
| Dezirас Korespondi....................... | " | 12 |




Estimata abonanto,

Ni dankas la facilan kaj entuziasman ricevon ĉe la fermo de la 32ª Kongreso de Vigo rilate al la plialtiĝo de la jarkotizo per 50 pesetoj pliaj.


Tial ni anoncas al ĉiuj niaj amikoj ke ekde la jaro 1973ª la kotizo estas 100 pesetoj.

La eksterordinara atento al ideoj proponitaj de HEJS en la nomita Kongreso permesis grandan kapton de novaj anoj; tiel multe, ke nia stoko ne sufiĉas por sendi la revuon al ĉiuj en la nuna jaro. Ni antaŭ petas pardonon se iu ne ricevas pasintajn numerojn.

Restas al via dispono por klarigi dubon aŭ akcepti novajn ideojn.


LA ESTRARO

Noto.- Ĉiuj niaj membroj, mal pli ol 25 j. kiuj ĝis nun ankaŭ ricevis "Boletin" ekde 1973 se ili deziras daŭrigi rizevante ĝin debos aboni aparte al HEF.



# NIAJ DELEGITOJ

Tiu -ĉi membroj estas niaj HEJS-delegitoj en diversaj hispanaj urboj. Por kia ajn demando aŭ por pagi la kotizon, venonte, bonbolu turni vin al la koncerna delegito en via urbo.




JOSE CARLOS QUINTAS MONTERO.
Avda. Generalísimo 374- Chapela-Vigo
MANOLITA VALENCIA.
Calle de Jesús 3-Cheste- Valencia
ANA MARIA HERNANDEZ.
Calle María Lostal 25 5º 12 - Zaragoza
ROSARIO ROCA.
Doctor Ullés 113 piso- Tarrasa- Barcelona
CARMEN HERRERA.
Calvo Sotelo 11- Valencia 2
RICARDO SANCHIS. Piqueras Calle Soledad Domëndi 5 5º
Valencia 10
JUAN RAMON GUIÑON ROSET.
Wifredo 6-3º 2ª - Barcelona 1
ANTONI MARSO.
ICarretera-Carrerfont 12-Folgueroles-Barcelona
AURORA CASQUERO DE LA CRUZ.
Cuartel Guardia Civil de Benimadet- Valencia
ANA REGULO.
Apartado 25- La Laguna- Tenerife- Canarias
ENRIQUE ALBERTO NADAL.
Subida a San Isidro 2 - Concentaina - Alicante
CONCHITA VERDU DIEZ.
Delegacion de Hacienda-Alicante



JUAN AZCUENAGA.
Capitan Palacios 3-4ºN - Santander
Jaime MOLERA.
Sta. Joaquina 13- Moya - Barcelona
M. CARMEN FERRER.
Valencia 587-3º1ª - Barcelona 13
ANA HERNANDO.
Escuelas de Asistentas Sociales-Hospital General de Asturias- Oviedo
PEDRO NUEZ.
C/ Muntaner nº 416-1º1ª- Barcelona 6
ADONIS GONZALEZ.
Avda. del Mar 4-5º-A - Oviedo

# Ni TraNKviLE ATendas .........



Nia epoko, estas la periodo de hormonoj, antibiotikoj kaj drogoj.

La vivo de la maljunuloj estas multe pli longa ol antaŭ. Kiam ilia forto malkreskas, dozo da adekvata medikamento permesos ke ili denove legu ĵurnalon; je la dua pilolo aŭ injektaĵo, ja kuraĝos salteti, kaj ĉe la tria, kelkaj eĉ edziĝos por kvara fojo.

Ĉiuj bestoj nehejmigitaj, atingas kvinoblon de sia matureca fazo. Do, la homo endas vivi almenaŭ dum 125 jaroj.


Se iam la enterigaj kompanioj eldonus akcion, estus prudente, ke vi ne aĉetu ilin.

La faktoroj de la longviveco estas kvar: sanoheredo, maljunecaj malsanoj, intelekta laboro kaj renovigo de la seksaj hormonoj.

Senkonscie, la socialaj leĝoj malpermesas la laboron al pensiuloj. Post la emeritiĝo, nia intelekta agado estu aktiva. Ne sufiĉas fiŝkapti où legi. La legado, multfoje, estas preteksto por senagado. Ni verku, desegnu, traduku, unuvorte: kreu.


La mensa gimnastiko rejunigas la spiriton. Oni renovigu la hormonojn por tiel energie kaj plaĉe trairi la maljunulan vojon. La Konstanta kontakto kun gejunuluoj estas ege konvena.

Tiu ĉi artikolo, en nia junulara gazeto, ŝajnas paradokso. Tamen, pritrakti ĉi temon, estas interesa, ĉar ni - se antaŭe la nigrevestita sinjorino ne estas falĉinta nian vivan fadenon- atingos tian belan stadion, kie la medito fariĝas serena kaj profunda, sen hasta junula pripenso.



Ankaŭ higiena zorgado (marŝado, sporto, masaĝo, sur banoj, gimnastiko, ktp) refresigas kaj konservas la korpan sanon.

Dum mia vivo, mi konis maljuneskajn kvardekjarulojn kiujn la edzino trozorgadis, malpermesante ilin fumi, kaj preparante por ili ĉiutagan rilifloran infuzaĵon, kaj poste, dum tridek jaroj, ŝi oferis floroj sur lian tombon.



Petro Nuez


4




¡ DANKON !




| | |
|---|---|
| S-ro. Serrano Pérez ........................ | 100Ptoj. |
| Pedro Nuez .................................. | 145 " |
| Guesinjoroj Aragaj........................... | 100 " |
| Juan Ramón Guiñon ........................... | 50 " |
| Esperanto Grupo de La Laguna................ | 100 " |



# - VIGO - 5

Mi ne rakontos al vi pri la pejzaĝaj belecoj, nek pri la mirindaj galicaj enfluejoj, nek pri iaj diversaj belaĵoj kiujn ni trovis dum la kongresaj tagoj.

La unua tago estis saluta tago, ĉar ĉiuj zorgas saluti malnovajn geamikojn kaj ankaŭ faras novajn gekonatulojn. Ni trovis multajn junajn vizaĝojn kiuj jam estis pasintjare en mediterranea Alicante, sed tamen ni konstatis ke estis aliaj gejunuloj, novaj esperantistoj, kies semo ni esperas kaj deziras fruktodonu efike por nia movado kaj por H.E.J.S.

Meso en esperanta lingvo okazis la 21-a, kaj poste la oficiala kongresa inaŭguro, kie salutis nome de H.E.J.S. nia prezidanto; diversaj gejunuloj salutis reprezentante grupojn. Post la tagmezo estis programita? kunveno de nia sekcio, kiun ni profitis por zorgi la tagordon por nia oficiala kunsido. Nokte, dum la vere amuza balo por nia junularo, prezentis la ĉijaran F-ino Esperanto, kiu estas Elvira Alvarez, ĉarma viga belulino kiu multe helpis en la kongresa laboro.

Bela ekskurso ni ĝuis tra la viga enfluejo kun vizito al konata fabriko "Masso", kaj la surprizo vidi, kvankam mortaj, apud tiu fabriko tri balenojn. Interesa konferenco pri "Europeismo" kaj belega kaj laŭdinda prezentado de diapozitivoj kun hispanlingvaj komentarioj por neesperantista publiko estis vespere, ambaŭ de Pedro Nuez, kiun ni sincere gratulas. Nokte ni estis invitataj ĉeesti Hispanaj Festivaloj, kie ni amuzis kun la danco de Rafael de Córdoba.

Dimanĉe ni ekskursis tra diversaj lokoj, sed ni haltis en Panjón, kun belega preĝejo; Bayona, kie ni vizitis la restadhaltejon Grafo Gondomar; Monto Santa Tecla, kie ni devus vidi belajn pejzaĝojn, sed kion ni ne eblis plenumi pro la nuboj; Tuy, mirinda katedralo; kaj Porriño, interesa urbodomo. Surpriza ritaro en belega marko, sur ŝipo tra la viga enfluejo, ni ĝuis nokte en mirinda, tradicia "Queimada". Por la ne-

HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO

ĉeestantoj, ties "Quimada" estas tipa galica festo kie per diversaj bruligitaj trinkaĵoj kaj la malrapida kaj sinsekva agito preparas tre gustuman likvoron, kaj kun la akompano de tipa galica muziko. Ĉio ĉi formas la plej riĉoplenan etoson por feliĉo kaj amuzo. Post la fino de la ritaro estis balo por ĉiuj, tial ke ĉiuj amuzis dum la ŝipa promenado tra la plej belaj pejzaĝoj de la enfluejo.

Matene la lundo okazis la ĝenerala asembleo de H.E.F. kaj nia prezidanto reprezentis nin en la estrara tablo. Estis ŝanĝo en la statutoj per kiuj nia reprezentanto havas rajton ne nur paroli, sed ankaŭ voĉdoni. Menciis nian intencon organaizi venontjare la SEMED en nia lando, kaj multe pliaj aferoj interesaj por la pli efika laboro de nia supera nacia organizo. Poste ni vizitis Muzeon Quiñones de León, kie nin salutis kaj invitis la urbestro de Vigo. Vespere estis la ekzamenoj, la kunveno de H.E.J.S., hispanlingva parolado de S-ro Moreira, fermo de la kongreso, omaĝo al S-ano Oliván kaj tipa folkloro el Galico.

Sendube estas pli interesa por ni la kunveno Hejs. Post prezenti la ĉeestantaj estraranojn, la Prezidanto klarigis kio estas HEJS kaj ankaŭ informis pri T.E.J.O. La Helena Junularo oferis al ni la organizon de la III-a SEMED, kaj ni akceptis kiel loko Alicante, kies esperantistioj sindone oferis helpi nin kaj organizi ĝin surloke. Pri vera kaj efika kunlaborado de la reprezentantoj, afero jan traktita dum la pasintjara kongreso, estis diversaj opinioj kaj ankaŭ bezonis klarigi demandojn rilate la revuo kaj HEJS. Grava punkto, post prezenti la kontoj, estis la plialtiĝo de la kotizoj, ĉar la nuna ne sufiĉas por eldoni la revuon, kaj HEJS deziras plivastiĝi la agadon laŭ la celoj por kio estis fondita la sekcio. Varme akceptis plialtiĝon ĝis 100 pesetojn jare, kaj ĉiu membro kiu deziras esti membro de H.E.F. devos pagi rekte al la Federacio la koncernan kotizon. Inter la ideoj kiujn ni eblos plenumi oni menciis eldonon de adresaro, propagandon en la revuo, organizadon de internaciaj kunvenoj, specialan tagon por la junularo dum la naciaj kongresoj, kontaktojn inter nia junularo, ktp.

Nokte estis la oficiala Bankedo, kie parolis

ĉiuj kaj ne okazis balo kiel pensis la junularo.
La kongreso finis per ekskurso; ni vizitis Padrón, Santiago de Compostela, Villagarcía de Arosa kaj La Toja; mirinda vojaĝo.

Inter miaj kongresaj impresoj elstaras la konvinkon de hispanlingva kongreso sub la verda standardo. Mi firme pledas al vi ĉiuj parolu esperante. Ne sufiĉas diri ke Esperanto estas facila kaj utila, necesas pruvi ke vere kaj efektive Esperanto taŭgas por kunligi homojn per aŭtentika interkomprenigo. Tro pezaj estis la dankaj vortoj post la Bankedo, ĉu ne sufiĉus unu dankeman personon kiu parolus nome de ĉiuj? Fine, mi rimarkis la gajan etoson kaj kuniĝon kiu regis inter la junularo dum la tuta kongreso kaj kiujn pli bone reliefigis per la ĉiunoktaj eksterprogramaj festoj, kaj la veran kaj sinceran amikecon inter gejunuloj el la plej diversaj regionoj de nia lando.

JUAN AZCUENAGA




DE "EL CORREO ESPAÑOL".

# TEJO X Kongreso

Al F-ino Johana Hernandez Royo, esperantistino el Sabadell (Barcelono), kiu kune kun F-ino Pilar R. Malón, el Valencio, ĉeestis la TEJO-Kongreson en Torun kaj la Postkongreson en Gdansk (Polando) oni faris la jenan intervjuon:

- Kiel vi alvenis al Torun?.

- Ni alvenis tre lacaj pro la alta temperaturo, kaj ankaŭ pro la ne tre konforta kaj multikilometra veturado per trajno, sed tamen, kun granda iluzio povi resaluti la esperantistajn geamikoijn, kiujn ni konis en aliaj internaciaj E-Kongresoj kaj okaze de la lasta Junulara Seminario de Esperanto en Hamburgo.

- Ĉu estis multaj gepartoprenantoj en tiuj Kongres-urboj?.

- Ili estis proksimume 300 gejunuloj el 20 landoj, inter ili, Usono, Japanujo, Maŭritanio, Meksiko... En la Postkongreso, tamen, nur ĉeestis 100 gejunuloj.

- Ĉu la Kongres-urboj estas belaj?.

- Ĉiuj polaj urboj, kiun ni vizitis estis tre interesaj kaj ili diversmotive diferencas de aliaj eŭropaj urboj. Laŭ mia opinio, la plej belaj el ili estas tiuj, kiuj situas ĉe la bordo de la Balta Maro, precipe Gdansk kaj Sopot.

- Kion vi konsideras plej grava el tiu TEJO-Kongreso?.

- La ĉefaj programeroj de la Kongreso en Torun temis pri la tutmonde konata astronomo Koperniko, ĝuste naskiĝinta en la Kongresurbo Torun, kaj ankaŭ pri la gejunularo el la t.n. TRIA MONDO, sed por mi la plej interesa kaj distinginda fakto el ĉiuj Junularaj Kongresoj de Esperanto estas la frateca kunvivado kaj sincera kamaradeco reganta inter la gepartoprenabtoj, kune kun la granda ĝojo, kiun oni sentas ĉe rekta



konversaciado kun kongresanta eksterlandano. Ja estas mirige, ke oni povas kompreni sen helpo de interpretisto, nur pere de Esperanto!.

- Ĉu iun anekdoton vi memoras?.

- Jes, la Pola Artemsemblo "IMPRESO", konsistanta el gejunuloj, kies gvida profesorino estas esperantisto, post prezento de admirindaj folkloraj dancoj kaj kantoj, per kiu ili regalis la gekongresantojn, promesis lerni Esperanton por aktive ĉeesti la venontjaran TEJO-Kongreson en Jugoslavio. Ankaŭ saman deziron, tuj lerni la Internacian Lingvon, esprimis la rektoro de la Universitato "KOPERNIKO" en Torun, konstatinde kiel facile la gekongresanoj interkompreniĝis per Esperanto.

Fine, kaj kiel kuriozaĵon, mi volas mencii, ke en la Kongreso mi renkontiĝis kun du konatoj, ili estas: S-no. Dobrzynski, iam vizitanta Sabadell-on, kie li manĝis ĉe mi, kaj la instruinston rusan, S-no. Kolker, kun kiu mia patro korespondas por intersanĝo de filatelaĵoj.

Jen ĉio!.

SABADELL-ANO



Rezolucio de la INTERNACIA SEMINARIO DE ESPERANTISTOJ pri la temo: BALTA MARO-MARO DE PACO, en Gdansk 22-25.07.1972

De la 22-a ĝis la 25-a de julio 1972 okazis en Gdansk Internacia Seminario de E-istoj sub devizo -"Balta maro - Maro de Paco"-, kies organizantoj estis: Interaltlerneja Scienca Rondo de E-istoj, aganta sub patroneco de Eksterlanda Komision de Distrikta Konsilantaro de Unuiĝo de Pola Naŭtologia Societo; Vojevodia Kulturdomo; Prezidantaro de Urba Popolkonsilantaro en Gdansk; Studenta Asocio de Amikaj de UNO kaj Rondo de -Junularo "Verda Golfo". Honoran patronecon super la Seminario akceptis Prezidanto de Urba Popolkonsilantaro, mgr-o Jan Nikolajew.


La Seminarion ĉeestis reprezentantoj de 20 landoj kaj nome: de Anglujo, Austrujo, Bulgarujo, ĉeĥoslovakujo, Danujo Finlando Fancujo, Hispanujo, Jugoslavio, Kanado Meksiko, Nederlando, Germana Demokrata Respubliko, Germana Federacia Respubliko, Norvegujo, Polando, Svedujo, Usono, Italujo, Hungarujo kaj Sovetunio.

Surbaze de referaĵoj, oni pridiskutis dum la Seminario la problemojn pri paca ekspluatado de rezervoj de Balta Maro kaj pri konkorda kunlaborado de ĉiuj ĉebaltaj kaj skandinaviaj landoj.

En rezulto de la diskuto ĉeestantoj konstatis, ke oni devas diskoniĝi la problemojn de Balta Maro, por ke ili estu konataj al mondopinio. Oni devas prigrandegi kvanton de publikaĵoj pri ĉi tiu temo kaj pri larĝe obligi ilian havigon.

Sciencaj esploradoj de ĉiuj institutoj kaj sciencesploraj filioj, koncernantaj baltan problemaron postulas kunordigon. Balta Maro devus fariĝi cento de daŭra, paca kunlaborado de ĉebaltaj kaj skandinaviaj landoj.

Tiucele estas nepra sistema informado pri Balta

Maro kaj aranĝado de kontantaj, periodaj renkontiĝoj de tieslandaj reprezentantoj kaj dume detala priparolado de aferoj pri evoluo de ilia kunlaboro.

Dum la solena fermo de la seminario oni akceptis sekvantan rezolucion kaj decidis enkonduki ĝin en la vivon:

I.- Sciencaj seminarioj sub devizo: "BALTA MARO-MARO DE PACO" estos laŭ vice organizitaj, ĉiujare de unu ĉebalta aŭ Skandinavia lando, kaj ĉiu seminario estos dediĉita al unu aparta problemo.
Post fino de ĉiu seminario estos eldonata speciala bulteno, enhavante koncernantajn raportojn kune kun rezolucio kaj la plej gravaj referaĵoj.

II.- Balta Bulteno - jen la titolo de la bulteno, kiu estos eldonata almenaŭ unufoje en la jaro, de filioj, okupantaj sin pri la problemoj de Balta Maro kaj senpage dissendata al interesiĝuloj. Sidejo de Redakcia Komitato de la bulteno troviĝos en Balta Instituto en Gdansk.

III.-Oni devas analizi eblezon pri fondo de Internacia Organizaĵo por Paca Kunlaboro sur Balta Maro kaj determini ĝian agadkampon. Ciuokaze ĝi devus gvidi komunan eldonan agadon pri selektitaj temoj, interesaj por ĉebaltaj kaj skandinaviaj landoj, ekzemple, pri E-movado en ĉi tiuj landoj.

IV.- Balta Kultura Festivalo - tio estas Festivalo de Cebaltaj kaj Skandinaviaj Landaj, devus esti organizata ĉiujare de apartaj ĉebaltaj kaj skandinaviaj landoj, kun celo de prezentado kaj diskoniĝo de ili folkloro, kultura akiraĵo kaj kutimoj.
Ĝi okazos unufoje en 1974 en Gdańsk.



JANUZS WOLAK

# DEZIRAS KORESPONDI:

BERNHARD OTTO 34-jara, ĝardenisto ankoraŭ nova esperantisto, kun hispan(in)oj. Lia adreso: 7801 LEUTERSBERG; BUNDESSTR 7 - DEUTSCHE-BUNDERRESPUBLIK.

Stanislav Toman, kun hispan(in)oj. Lia adreso: ZALENINA, PODNIK RED MLYŇSKA 62, JIHLAVA. ĈEĤOSLOVÁKIO.

JUVENAL FERNANDEZ DOS SANTOS 12 jara, kun geknaboj el la tuta mondo, li ŝatas sporton, muzikon kaj legadon. Lia adreso: QE-3 Conjunto F Casa nº 115-Guara-Brasilia-df-Brasil.

EVA VATI 17 jara, lernantino de gimnasio kun hispanaj gejunuloj. Ŝia adreso: MERNYE Str. LENIN 49, Somogy Megye- HUNGARIO.

JUDIT VARGA 17 jara, ankaŭ lernantino de gimnasio kaj amikino de Eva, kun hispanaj gejunuloj. ŝia adreso: MERNYE Str. LENIN 61- Somogy Megye- HUNGARIO.

ANNE JADAL 16 jara, kun hispanaj gejunuloj. Ŝia adreso: Regari Pst. 16A - 200019 Tallinn- Estonia. USSR.

RENATE LAMPE 17 jara, kun hispana junulo, ŝi interesiĝas pri moroj, manĝkutimoj kaj vivkutimoj, ankaŭ pri muziko kaj danco, Ŝia Adreso: DDR 356 SALZWEDEL-Str. MITTELSTRASSE 9. Renate kolektas poskartojn kaj bildkardtojn.

EVA TOTH 20 jara, studentino, ŝi okupiĝas pri frendaj lingvoj, kun hispanaj gejunuloj kiu kolektas bildkartojn. Ŝia adreso: Budapest VII-IZABELLA U.2.11.12-HUNGARIO

